
ENKONDUKO EN LA KULTURON

# HISTORIO DE NEDERLANDO

AGOSTINHO DA SILVA

EL LA PORTUGALA LINGVO TRADUKIS

JOSÉ DE FREITAS MARTINS



PORTUGALA ELDONA RONDO

# RICEVITAJ LIBROJ

**SKIZOJ PRI NEDERLANDO** — de Karel Čapek. Trad. de G. J. Degenkamp el la ĉeĥa lingvo. Eld. Libro-Servo F. L. E., Roelantstraat 4, *Amsterdam-W* (Nederlando). 19 ½ × 13 cm. 96 paĝoj. Broŝ. ned. guld. 1, 75 (20$00 aŭ 12 rpk. afrankite ĉe nia Libro-Servo).

La eldoninto havis brilan ideon produkti tiun bonegan libreton pri Nederlando kaj vendi ĝin favorpreze al la partoprenintoj de la SAT-kongreso okazinta em Amsterdam de 31. VII. ĝis 5. VIII. 1948a.

De multaj jaroj ni deziras viziti la «verdan» Nederlandon, sed post la legado de la Skizoj nia deziro multe obliĝis. Certe al multaj aliaj legontoj same okazos, kaj tiuj, kies ekonomia situacio tion permesos, eble ne forgesos viziti Nederlandon kaj ĝiajn grandnombrajn kaj agemajn «verdulojn». Ni mem ankaŭ intencas kaj esperas fari tion, kiam niaj financoj tion ebligos.

Ĉapek, kiu antaŭ multaj jaroj partoprenis internacian kongreson de literaturistoj okazinta en Den Haag, vizitis Nederlandon kaj surpaperigis siajn impresojn per trafaj skizoj. Em 1932a tiuj skizoj aperis libroforme en ĉeĥa lingvo. La ĉeĥa verkisto majstre skizis ĉarmajn, amuzajn kaj instruajn bildojn pri nederlandaj tipoj, pejzaĝoj, ŝipoj, kanaloj, ventmuelejoj, aroj da biciklantoj, polderoj, dunoj ktp. Kalejdoskope aperas la multfaceta vivo de la nederlandanoj antaŭ niaj okuloj. Sed Ĉapek bildigis la observitajn reproduktindaĵojn ne nur per la plumo, sed ankaŭ per la krajono. Kaj la rezulto estas verko traŝutita per amuzaj, iom karikaturaj bildoj, kiuj igas ĝin ankoraŭ pli valora; ĝi tial estas vera ĝuo ne nur por la spirito, sed ankaŭ por la okuloj.

Pri la lingvaĵo de la libreto ni simple diru: ni restis ravitaj de la klaraj kaj bonaj esprimoj kaj flua stilo. La tradukinto meritas multan laŭdon. Certe, pedanto ĉiam trovas ion por kritiki. Ni tamen ne imitu kaj ignoru tian ulon.

Al niaj legantoj ni konsilas la legadon de Skizoj pri Nederlando, kiel kompletigon de la scioj akiritaj per legado de Historio de Nederlando. Inversan rekomendon ni farus al la legintoj de la Skizoj...

***M. F.***


ENKONDUKO EN LA KULTURON

# HISTORIO DE NEDERLANDO

AGOSTINHO DA SILVA

EL LA PORTUGALA LINGVO TRADUKIS

JOSÉ DE FREITAS MARTINS



1948

PORTUGALA ELDONA RONDO

Monte da Lapa, 49-1.º

PORTO (Portugalio)

KONTROLITA DE LA LITERATURA KOMITATO

Krom la LITERATURA KOMITATO de F. L. E., ankaŭ Sam.no Velthove bonvolis doni al ni tre utilajn lingvajn konsilojn. Al la kontrolintoj nian koran dankon.

PORTO
TIPO. J. R. GONÇALVES, LIMITADA
RUA DA PORTA DO SOL, 32

La romanoj konsideris Nederlandon la plej stranga lando, kiun ili konis. Por ĝin atingi, la legioj devis trairi vastajn arbarojn tute kovritajn de nebulegoj, aŭ trapasi sekajn ebenaĵojn, ĉe kies bordoj ĉiam aŭdiĝis la monotona plaŭdado de la maro. Kaj, kiam ili alvenis, ili troviĝis sub eterne griza kaj malalta nubotavolo, kun oftaj ŝtormoj, kaj paŝadis sur marĉa kaj danĝera tero, kiu ĉiumomente forglitiĝis sub iliaj piedoj aŭ subite kovriĝis per ŝaŭmo de la ondoresaltoj. La homoj, kiuj vivadis en tiu lando, estis negajemaj, silentemaj kaj estis okupataj de siaj laboroj kaj pensoj, sed la invadintoj rimarkis, en ĉiu el iliaj gestoj kaj rigardoj, la decidemon je nerenversebla rezisto. Kiam oni demandis ilin pri la historio de la popolo, oni ricevis nur la respondon, ke jam iliaj gepatroj kaj geavoj, kaj la geavoj de iliaj geavoj, vivadis sur tiu forglitiĝema tero kaj dum sia tuta vivo bataladis kontraŭ la invademo de la maro. Tio estis konstanta batalado tage kaj nokte per malperfektegaj digoj ofte frakasataj de forta ŝtormo, dum kiam iufoje la maro inundis dekojn da vilaĝoj. Sed la energioj ne malfortiĝis pro la akcidentoj kaj ili rekomencis la rekonkeradon, pacience, persiste, sen troaj heroaĵoj, kiuj estus senutilaj kaj senenergiigaj, sed kun forta volo, kiun nenia kontraŭaĵo kapablis malpligrandigi.

Tiu senĉesa batalado, tiu kuraĝa akcepto je tio, kion al ili la mondo oferis kiel bazon de la tasko, kiun ili kapablos plenumi en la mondo, igis la tieajn homojn inklinaj al ĉiuj entreprenoj postulantaj pripensadon, flegmon kaj decideman karakteron. Ili impulsis la laboron kaj la laboro mem ilin hardis. Ĉiu sin sentis kapabla je grandaj faroj, kun firma sinfido, kaj samtempe sciis alte taksi la tutan valoron de la helpo, kiun al li donis liaj kunuloj. La fiereco pri la ebloj de lia propra laboro fandiĝis kun la pli vasta fiereco pri la valoro de lia grupo. Tamen lia scio pri sia valoro ne ĉirkaŭfermis lin for de la eksteraj influoj: tra la sudaj ebenaĵoj venis, komence la instruoj de la galloj, poste tiuj de la romanoj; la riveraj vojoj de Rejno kaj Mozo igis Nederlandon la renkontejo de germanoj, francoj kaj angloj. Aliaflanke, la grundo estis malmulte produktiva; granda parto de la tero estis sabloza kaj nur ie kaj ie kuŝis bedoj kaj herbejoj. La nederlandanoj impetis al komercado, navigado kaj fiŝkaptado, profesioj, per kiuj ili povis akiri la porvivon kaj ĉe kiuj ĉiuj iliaj ecoj trovis bonegan agadkampon. Ne perdante sian propran karakteron, ili asimilis ĉion, kion ili trovis plej bona ĉe la aliaj.

Nederlando estis do lando de komercistoj kaj maristoj. La loĝantaro grupiĝis preskaŭ tute en la urboj, kiuj estis, eĉ en la XVIa jarcento, ankoraŭ sufiĉe malgrandaj. Famaj urboj, kiel ekzemple Leiden kaj Amsterdam, havis ne pli ol 20 mil loĝantoj. En tiuj ĉefaj loĝolokoj oni establis industriojn de ŝtofoj kaj biero, kiuj liveris la ĉefajn eksportaĵojn. El eksterlando la nederlandanoj importadis tritikon, fiŝojn kaj salon

Ordinare ĉiu komercisto disponis nur unu ŝipon, kiun ofte li mem komandadis. La komandantoj havantaj propran ŝipon kaj vivotenantaj sin per la frajtenspezoj ankaŭ ne transpasis mezan klason, kiu tute akordis kun la nederlanda karaktero. La komercaj oficistoj, laboristoj de la fabrikoj kaj maristoj estis malriĉaj, sed tamen ili ricevis pli altan salajron ol iliaj samprofesiuloj el aliaj eŭropaj landoj.

Ĉiuj estis scivolemaj kaj kleriĝemaj; inter ili estis malmulte da analfabetoj, eĉ inter la homoj el la plej malaltaj klasoj. Ĉiuj sentis pli-malpli klare, ke la kulturo estas unu el la grandaj rimedoj, kiujn ili disponas por perfektigi kaj firmigi sian personecon, por sin levi super la seninteresa vivo de la bestoj aŭ de la sklavoj.

La popolamaso de la lando konsistis do el meza klaso, kiu havis sufiĉe por vivi kaj kiu, malgraŭ ĉiuj neperfektaĵoj, kutimaj ĉe meza klaso, havis grandan senton pri la individua digno kaj estis inklina ĝin defendi en ĉiuj cirkonstancoj. En la ĉiutaga vivo tiu inklino montriĝis per granda respekto pri la aliulaj opinioj, en la politika vivo per la demokratia organizado de la landa regado.

La provincoj estis sendependaj: ĉiu havis sian *stadhouder*-on aŭ guberniestron, kaj la impostoj povis esti imputitaj nur post permeso de la Generala Delegitaro aŭ Parlamento, en kiu partoprenis delegitoj de la nobelaro, de la grandaj urboj kaj kelkfoje de la pastraro. Ĉiu provo malatenti la individuajn rajtojn estis energie forpuŝata, kaj la ligiteco de la nederlandanoj al siaj hejmo, familio kaj negocoj ne devigis

ilin seninteresiĝi pri la aliula libereco. Ĉar la regado koruptas la homojn, eĉ se ili estas nederlandanoj, iam kaj iam estis necese kontraŭstari la tiranecajn provojn. Kaj tiam civitano tute ne estis sola; ĉiuj homoj el lia korporacio, el lia klaso aŭ el lia urbo viciĝis en la saman batallinion kaj la *stadhouder* aŭ la nobelo estis devigata forlasi siajn pretendojn.

Oni komprenas, ke tiu demokratia sento pri la publika vivo, tiu ŝato al individua sendependeco, la altnivela kulturo de la plimulto el la civitanoj kaj la kritika saĝo, kiun preskaŭ ĉiuj havis, liveris bonan kampon por la disvastiĝo de la ideoj de la protestantoj, kiam ili aperis en la XVIa jarcento. Tamen ili ne akceptis ilin entute kaj kiel dogmon: la homoj, kiuj cent jarojn antaŭe aplaŭdis la herezojn kaj la mistikon de Groote kaj Ruysbroeck, komprenebIe estis malfavoraj al Romo, sed ili ankaŭ ne estis inklinaj sin fordoni pasive al la luteranoj. Hoen modifis la germanan protestantismon kaj influis Zuinglio, svisan reformiston. Nur pli poste kaj jam kun la signo de forto, kiu kuraĝigis al ribelo, la nederlandanoj sin lasis regi de la kalvinistaj doktrinoj. Sed, kun la tuta diferenco pri sektoj kaj individuaj opinioj, la nederlanda popolo estis, tutkune, favora al la reformo; la fimora konduto de la pastroj, la riĉeco de la preĝejoj kaj la papa despotismo sufiĉe pravigis la agadon kontraŭ la katolikoj.

Sed Karlo Va, energia kontraŭulo de la protestantoj, de post la unua kvarono de la XVIa jarcento fariĝis la estro de la 17 nederlandaj provincoj, per la konkero de la duklando Gelderland.

Politike la reĝimo de Nederlando ne multe ŝanĝiĝis: la ĝenerala guberniestro loĝis en Bruselo, kaj lin helpis en lia tasko privata kaj financa konsilantaroj, kiuj konsistis el juristoj kaj nobeloj. La ŝtata konsilantaro, kiu havis nur konsultiĝan voĉon, konsistis el eminentuloj el la du unuaj konsilantaroj. En la provincoj daŭrigis la regadon la *stadhouder,* kiu ĝenerale estis nobelo, asistata de konsilantaro el nobeloj kaj leĝistoj. Koncerne religion, la inkvizitoroj estis aperintaj en 1523a kaj la viktimoj komencis fali. La subpremado sur la individuan konsciencon ege indignigis la nederlandanojn. Ankoraŭ ne estis fortoj por ekribeli, sed ĉiuj sin montris kontraŭaj; eĉ inter la funkciularo, kiu obeis la ordonojn de la imperiestro, troviĝis tiaj. Tiuj, kiuj ne povis plu elteni la religian subpremadon elmigris al Anglujo, al la bordoj de Rejno, al la Emden-regiono en Germanujo; la aliaj, sentante sin pravaj kaj plenaj de volo, atendadis favoran momenton por defendi per armiloj la rajton al libereco pri kredo.

La abdiko de Karlo Va, en 1555a, ne igis malpli malbonaj la rilatojn inter la registoj kaj la popolo. Filipo IIa, kiu fariĝis la nova reĝo, forgesis, pro religia fanatikeco, kaj malgraŭ ĉiuj liaj administraj ecoj kaj inteligento, ke la misio de Hispanujo konsistis el ampleksado kaj komprenado de la mondo, kaj el alvoko al solidareco de la popolo reciproke plej fremdaj. La religia subpremado fare de la katolikoj pligrandiĝis per la kreskanta superregado de la pastroj: la centra registaro klopodis ekstermi ĉiujn manifestadojn de la nederlanda demokra-

tio; laŭmezure kiel la episkopoj plinombriĝis, malplinombriĝis la kunvenoj de la Parlamento.

La reĝo de Hispanujo klare montris la intencon plenumi absolutan regadon, kiu ebligos al li pli facile trudi la religiajn doktrinojn, kiuj plej plaĉis al li. Eĉ, religio kaj regprocedoj eble ne estis alio ol du aspektoj de centra agado. La malkontenteco okazigita de tiaj decidoj aldoniĝis al tiu kaŭzita de ekonomiaj motivoj: la eksportado de teksaĵoj malpligrandiĝis pro la angla konkurenco kaj pro la agitiĝado, kiu maltrankviligis la vivon de la lando. Mankis tritiko, ĉar ne estis produktoj por liveri interŝanĝe; la grandaj elspezoj por administrado plialtigis la impostojn, kiuj senkompate premis la popolon. Komence la reĝo ne riskis batali malkaŝe: en 1560a la hispanaj trupoj foriris el Nederlando pro la influo de la nobeloj; en 1564a ankaŭ Granvelle, estro de la ekleziula hierarkio, kiun la nederlandanoj malamegis, foriris al Hispanujo.

Tamen, la Inkvizicio daŭrigis sian agadon kaj en 1565a la luteranoj kaj la kalvinistoj redaktis kontraŭ ĝi la «kompromison de la nobeloj»: ili sin devontigis ne obei religiajn trudojn kaj sin defendi per ĉiuj eblaj rimedoj kontraŭ la provo subpremi la konsciencojn. Se interbatalado komenciĝos, iu ajn el la subskribintoj havos siaflanke ĉiujn aliajn. Samtempe oni kunvenigis la Parlamenton kaj la estroj de la ligo de l'nobeloj ekinterrilatis kun Vilhelmo, princo de Oranĝo kaj kun la grafoj Van Egmont kaj Van Hoorne. La lando organiziĝis por la ribelo. La sinteno de la regantoj estis absoluta nekompre-

nemo: laŭ ilia opinio la «ligo de l'almozuloj» [1] estos facile venkebla de bona korpuso de la hispana infanterio, kaj oni eĉ ne devis pensi pri cedoj. Oni pli limigis la liberojn, kio rezultigis, ke la ribela sento radikis pli profunden kaj ĵetis iujn ankoraŭ moderajn homojn al la malcedemo kaj vigla decidemo de la kalvinistoj. Preskaŭ tuta loĝantaro de la urboj kaj vilaĝoj partoprenis tiun lastan opinion: perforton ili respondos per perforto, netoleremon, se estos necese, per netoleremo. La sinteno de la registaro kaj la graveco de la alproksimiĝanta interbatalado malaperigis la ecojn je komprenemo kaj flegmo, kiujn la nederlandanoj ĉiam elmontris; sed ili altgrade plibonigis iliajn kapablojn pri decidemo kaj persistemo.

La du grandaj estroj de la ribelo estis Marnix van Sint Aldegonde, pamfletisto fekunda, ironia, inteligenta, persistema, kiu liveris la doktrinon, montris la esencajn direktojn kaj igis la popolon facile kompreni la politikan kaj religian pensojn defendatajn de li, kaj Vilhelmo de Orangô, la agema kaj konsilema homo, kiu celis la religian toleremon kun absoluta libereco por katolikoj kaj protestantoj, kaj tiu estis preta esti senkompata al ĉiu, kiu kontraŭos lian intencon. Li estis flegma, silentema kaj forta. Laŭ la familia vivo de la princo la nederlandanoj rekonis sian propran familian vivon, plenan je enpensiĝemo kaj simplanimeco; ĉe la publika agado li sin montris, kiel ili, malkonfidencema, prudenta kaj energia. Al siaj samlandanoj li estis amiko, bone akceptita en ĉiuj domoj de komercistoj kaj en ĉiuj kabanoj de kamparanoj, kaj al kiu oni konfidis ĉiujn sekretojn kaj ĉiujn

esperojn; al siaj kontraŭuloj li estis la enkarniĝo mem de la rezistado. La tuta nebridebla volo de la digokonstruisto, la tuta maltimemo de la maristoj, la tuta pacienco de la komercistoj koncentriĝis en Vilhelmo de Orangô kaj lin movis per la nekontraŭstarebla forto, kiun havas la homo en kiu eĥas, tute akorde kun la individua temperamento, la genio de lia popolo.

La unua perforta ago estis la *Beeldenstorm*, t. e. la detruado de la sanktaj bildoj, en aŭgusto kaj septembro 1566aj. La kalvinistoj atakis la preĝejojn, detruis la bildojn kaj la kultobjektojn, ekstermis la katolikismon. La moderuloj malaprobis, ĉar ili opiniis, ke oni bone solvos la problemon per nura premado sur la registaron. Margareto de Parmo, kiu tiam regadis Nederlandon kiel delegitino de Filipo IIa, komprenigis al ili, ke tio fakte okazos. Kiam ŝi vidis, ke ŝi allogis al si la simpation de granda parto da nederlandanoj, ŝi alvokis trupojn kaj komencis la kampanjon. La kalvinistoj, komandate de la princo de Orangô, bataladis per ĉiuj rimedoj, kiujn al ili povis liveri ilia fanatikeco, ilia fido pri la fina venko kaj la valoro de ilia ĉefo. Ili elmontris per batalado, dum kiam la aliaj interkonsiliĝadis, ke nur ilin Nederlando povas vere konfidi. Kaj Vilhelmo, jam kromnomita la Silentemulo, tion bone komprenis. Li malkonsentis pri multaj punktoj de la kalvinista doktrino, trovis la kalvinistojn netoleremaj kaj sciis, ke, se ili venkos, ili malfacile povos ne subpremi la katolikojn, sed li estis certa, ke per ili la libereco iam fariĝos en Nederlando. Certe, en tiu momento la akordo kun la teorioj estis malpli grava ol la akordo kun la praktiko; kaj la

senkompata batalagado de la kalvinistoj estis, reale, la nura rimedo uzenda kontraŭ tiaj kontraŭuloj. Malgraŭe, la kalvinistoj estis venkitaj, kaj en 1567a la katolikismo revenis, ĝuste same kiel la maro post detruo de la ŝajne fortika murego. La punondo ruliĝis tra tuta Nederlando kaj, post la alveno de Duko de Alba, tiom fanatika pri ideoj kiom la reĝo kaj pli kruela ol li pri agoj, la viktimoj nombriĝis po miloj. Egmont kaj Hoorne estis ekzekutitaj, kaj el la plej gravaj ribeluloj saviĝis nur tiuj, kiuj sukcesis transpasi la maran aŭ teran landlimon. Ĉiu nederlandano estis konsiderita herezulo, submetita je mortpuno aŭ arestado kaj konfisko de la havaĵoj. Oni aplikis ĉion, kio estis decidita en la Koncilio de Trento pri la eklezia organizado kaj subpremado de la protestantismo, oni i. a. fiksis la impostojn por eviti la okazigon de kunvenoj de la Parlamento. Nederlando fariĝis nura provinco de la imperio de Filipo IIa, submetita je la samaj religiaj doktrinoj kaj samaj politikaj principoj.

Vilhelmo de Orangô sukcesis forlasi Nederlandon kaj tuj faris la necesajn paŝojn por rekomenci la bataladon. Estis neeble plani enlandan rezistadon; la pedeloj de la Inkvizicio kaj la hispanaj kaj italaj trupoj scius rapide venki ĉiun provon, kaj la revenĝoj faligus grandan nombron da viktimoj, sen ia utilo por la afero. Oni devos doni la baton elekstere.

Li povis kalkuli je la apogo de la francoj, kiuj deziris la finon de la sieĝsituacio en kiu ili troviĝis kun hispanaj trupoj norde kaj sude. Preter la marbordoj de Nederlando krozadis la ŝipoj de la «maralmozuloj», ekipitaj per kalvi-

nistoj kaj luteranoj fuĝintaj el sia lando, kiuj, por vivi, sin dediĉis al marrabado. Oni ekatakis komence de 1572a. La piratoj ekprenis la urbon Brielle, poste la urbojn Vlissingen kaj Veere; la militistaroj de la princo invadis Nederlandon kaj multaj gravaj fortikaĵoj falis en la manojn de la ribeluloj. Kuraĝigite de la sukceso, la kalvinistoj, kiuj restis en Nederlando, reagadis kaj la liberigo de la lando ŝajnis certigita.

La hispana kontraŭagado ne malfruis. Duko de Alba ekkomandis siajn trupojn kaj la rekonkerado komenciĝis. La «almozuloj» sin defendis kun furioza energio, sed la urboj estis konkerataj post unu la alia. La milita forto de la duko estis grandega, lia talento de generalo multe superis tiun de la princo. Sed la nederlandanoj havis ankaŭ rimedon: la akvon. Kelkaj regionoj estis inundataj, kio malebligis la antaŭeniron de la hispanoj, tiel donante al Vilhelmo la okazon reorganizi siajn trupojn kaj aranĝi pli efikan rezistadon. Samtempe la korsaroj renkontis kaj venkis la hispanan mararmeon, certigante la superregadon sur la maro. Aliaflanke, Leiden kaj Alkmaar heroe rifuzis kapitulaci, malgraŭ la malsato kaj ĉiuj teruraĵoj de la sieĝo.

La nederlanda obstino superis la fortegan impeton de la trupoj de Hispanujo kaj pasigis la tempon por ke la ŝiparo de la «almozuloj» alvenu al Leiden, kiam la urbo atingis la lastajn rezistlimojn. Post furioza interbatalado, per hakiloj kaj ponardoj kaj en ĝisbrusta akvo, la hispanoj forkuris konfuze, kaj la liberigitaj civitanoj povis peti de la princo, rekompence por sia heroeco, la kreon de universitato. Ankaŭ

Alkmaar saviĝis, sed, ĝenerale, la interbatalado daŭris nedecidiga.

Francujo subite rifuzis helpon al la nederlandanoj kaj la angla helpo, pro la kontinuaj hezitoj de reĝino Elizabeto, alvenis malfrue kaj en nesufiĉa grado. Se la grandaj regnoj estus helpintaj Nederlandon, la liberiga milito daŭrus malmulte da tempo. La hispana superregado ne konvenis, sed ankaŭ ne konvenis forta kaj prospera Nederlando, kiu povus minaci la ekonomiajn kaj politikajn interesojn de la du landoj. Ŝajne la politiko celis, ke ambaŭ kontraŭuloj interkonsumu siajn fortojn.

Sed, dum ĉiuj malfacilaj jaroj, la fido de la nederlandanoj pri la venko daŭris neŝancelebla. La fanatikeco, simplanimeco, decidemo, disciplino, fido de la kalvinistoj pri supera povo, kiu ilin nepre savos, pri mondordo inkliniĝanta al ilia flanko, faris el la plej nesperta rekruto timigan soldaton, kaj el ĉiu disruinigita citadelo centron de rezisto, kiu konsumadis la moralan energion kaj la nombron de la soldatoj de la hispana militistaro. Ankaŭ Vilhelmo de Orangô ne dubis, ke ili fine venkos, kiom ajn malfacila la estonteco sin prezentos. La suferitaj malvenkoj estis por li la alta prezo de la venko kaj la lernejo, kie la nederlandaj fortoj pliboniĝis. Ilia afero estis justa kaj bone apogita per inteligento kaj volo. Ĉe la flanko de la hispanoj oni povis kontraŭmeti nur bonegajn trupojn kaj la blindan ambicion igi ĉiujn homojn egalaj.

La retiriĝo de Duko de Alba, poste la morto de lia anstataŭulo Requésens, ŝajnis igi malpli malfacila la nederlandan liberigon. En 1576a la provincoj Brabanto kaj Flandrujo ribelis, ebli-

gante la kreon de Konsilantaro kaj la okazigon de kunveno de la Parlamento. Hispanujo hezitis, cedis dum momento: en la packontrakto de Gent, en la sama jaro 1576a, oni decidis, ke la hispanaj trupoj tuj forlasos Nederlandon kaj ke la kalvinismo estos allasata en la nordaj provincoj. Tamen, Filipo IIa ne povis akcepti tian kompromison longedaŭra: ĝi estis tro humiliga al lia fiero. Li sendis al Nederlando Johanon el Aŭstrujo, sed la kalvinismo kontraŭagis milite kaj ekatakis, nomante Mation el Aŭstrujo ĝenerala guberniestro.

La milito eniris en pli viglan fazon, ĝuste kiam Nederlando malfortiĝis pro internaj disputoj: la netoleremo de la kalvinistoj ĉagrenis la moderulojn, la popolo kaj la nobeloj komencis kompreni, ke iliaj interesoj estas malsamaj. Nur la aŭtoritato de Vilhelmo konservis la pacon inter la partioj, sed Aleksandro de Parmo, la nova guberniestro nomita de Filipo IIa, lerte profitis la malkonkordojn kaj interkonsentis kun la sudaj valonoj, [2] kiuj parolis la francan lingvon kaj grandparte estis katolikoj. Tiun «Akordon de Arras» (1579a) sekvis kelkajn tagojn poste la «Akordo de Utrecht», laŭ kiu la Unuigitaj Provincoj de Nederlando deklaris sian sendependecon kaj sian decidon daŭrigi la bataladon, kaj ke ĉiu provinco havos la rajton preni sian oficialan religion. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kaj laŭ la ebloj efektivigi sur la tero noblan idealon, la toleremo de Vilhelmo venkis. Lia aŭtoritato tiom firmiĝis, lia gvidado montriĝis tiom efika, ke la hispanaj katolikoj konsideris lian murdon la nura rimedo sin liberigi de tia kontraŭulo. Okazis malsukcesantaj atencoj kontraŭ lia vivo,

sed en 1584a, en sia propra hejmo en Delft, Vilhelmo estis murdata de fanatikulo per pistolpafo.

La morto de la ĉefo ne malplifortigis la rezistadon, sed kontraŭe, ĝin plivigligis per nova indigno. Vilhelmo estis la martiro, kiu oferis sian vivon por la patrujo, kaj ĉiuj estis inklinaj lin imiti. La hispanoj suferis novan atakimpeton kaj malfortiĝis pro ĝi. La reorganizado de la nederlanda militistaro fare de princo Maŭrico kontraŭmetis al la ibera infanterio trupojn bone ekzercitajn kaj municiumitajn: rapidega serio da venkoj ĉesigis la hispanan superregadon. En 1609a oni faris milithalton, sed la definitiva packontrakto estis subskribata nur en 1648a. La interbatalado daŭris pli ol okdek jarojn.

Oni povas supozi, ke tiom longedaŭra milito tute ruinigis Nederlandon. Tamen okazis la kontraŭo. La industrio kaj la komerco eksterordinare disvolviĝis kaŭze de tio, ke la homoj plej inteligentaj kaj iniciatemaj, kiuj loĝis en la teritorioj sub la regado de la hispanoj, elmigris al la nordaj provincoj. La judoj, kiuj antaŭe forlasis Iberan Duoninsulon, jam alkutimiĝis al sia nova lando kaj komencis investi siajn kapitalojn en grandajn komercajn operaciojn kaj penetri en ĉiujn entreprenojn kun nelacigebla aktiveco. Aliaflanke, ĉar la ŝiparo de la «almozuloj» forigis de sur la nederlanda maro la hispanojn, estis eble sendi ŝipojn al la Baltaj landoj, al Anglujo, Francujo, Afriko, Hindujo kaj Suda Ameriko.

La komercistoj, inklinaj riski ĉion, posedantaj grandajn riĉaĵojn kaj bone rilatantaj kun la

komercaj medioj el la tuta mondo, rimarkis la prosperon de siaj negocoj kaj ilin organizadis sur modernaj bazoj, daŭrigante la movadon komencitan de la italoj. En la XVIIa jarcento, Nederlando jam havis financajn potenculojn, kiuj influis la politikon de la eŭropaj regnoj, posedis ŝipojn, konstruis kanonfabrikojn kaj ekipis militŝiparojn. La fondo de la Kompanio de Orienta Indio (1698a) signis elfaron de la volbo de la tuta nederlanda komerca konstruaĵo: la komercistoj konkeris unu el la plej riĉaj regionoj de la mondo, forpuŝis portugalojn kaj hispanojn el iliaj pozicioj kaj sin montris inklinaj konservi sian monopolon per ĉiuj rimedoj. La registaro protektadis per sia mararmeo iliajn ŝipojn plene ŝarĝitajn per spicoj kaj, por ke la kostprezo plialtiĝu en Eŭropo, ili sisteme detruadis la rikoltojn de la orientaj insuloj. Laŭ la interna vidpunkto, la Kompanio, kiu komence eldonis akciojn, baldaŭ fariĝis posedaĵo de la administrantoj. La Kompanio de Okcidenta Indio (Meza kaj Suda Amerikoj), ankaŭ protektata de la registaro, sin dediĉis al la kaptado de hispanaj galeroj, al sklavokomercado kaj al atakado al iberaj kolonioj en la Nova Mondo. Nederlando prezentis en tiu epoko perfektan ekzemplon de lando, kie la interesoj de la industriistoj kaj komercistoj intermiksiĝis kun la interesoj de la ŝtato. La veraj regantoj de la respubliko estis la komercistoj. La defendo mem de la religia libereco servis la komercan organizaĵon, ĉar ĝi ebligis rilatojn kun popoloj el la plej malsamaj religioj.

La situacio de la nederlandaj maristoj kaj laboristoj estis, kompreneble, malpli bona. La

salajroj, kvankam altaj kompare kun tiuj de la aliaj eŭropaj landoj, estis malaltaj rilate la vivonivelon de la nacio. Pro la lerta kombino inter la malaltigo de salajroj kaj la senlaboreco, formiĝadis preskaŭ mizera proletaro, ĉe kiu oni povis laŭvole akiri manlaboron. La laborkonfliktoj estis oftaj kaj kelkfoje gravaj, sed ĉar la korporacioj tiam estis vanaĵo, la laboristaro ne havis sufiĉe fortan subtenon por sin defendi. Ĝi estis sub la arbitro de la mastroj, kaj la ekonomia kaj socia situacioj pli kaj pli kondukis ilin al religia fanatikeco. Estis fakte ĉe la popolaj klasoj, kie la kalvinistaj pastroj varbis la plimulton el siaj adeptoj. La pensliberon la nederlandaj salajruloj konsideris luksaĵo de riĉuloj, dume la rigoreco de la kalvinista dogmo samtempe liveradis al ili la forton por elteni la penigan ĉiutagan vivon. Ĉe la kunvenoj en la preĝejo ili sin sentis inter siaj egaluloj, kaj ilia energio tie plivigliĝanta iam montriĝos per faroj.

Intertempe, pro la kreskanta povo de la komercistoj kaj pro ilia kreaĵo, la ŝtata punrimedaro, la laboristoj povis fari nenion pli ol eltenadi la kondiĉojn sub kiuj ili vivis. La vivo de la kamparanoj estis iom pli bona. Oni sekigis multajn marĉojn kaj lagojn kaj estis eble, pro kreo de paŝtejoj, komenci eksportadi laktaĵojn. Oni grandkvante eksportadis ankaŭ la terkulturajn produktojn, precipe tiujn, kiuj devenis de la legomĝardenoj. En la orientaj regionoj, kiuj estis malpli produktivaj, la vivnivelo de la kamparanoj estis pli malalta ol tiu de la urbaj salajruloj.

Ĝenerale, la popolo, kiu tiom bone kunlaboris por la revolucio, gajnis el ĝi nenion. La for-

miĝinta oligarkio de komercistoj kaj nobeloj ekspluatadis por sia profito ĉiujn eblojn de la lando. La ŝtata ofico fariĝis hereda, kaj oni zorge kaŝadis ĉiujn koruptojn kaj ĉiujn trompojn. Laste, la administristoj igis la juraplikadon unu el la partoj de sia superrega maŝino. Nur pri unu punkto la registaro kaj la popolo iom akordis: la kalvinismo sin instalis kiel nacia religio. Neniu estis persekutata pro sia kredo, sed la medio estis tia, ke la katolikoj elmigradis suden. La nacia sinodo en Dordrecht starigis la bonan doktrinon kaj reorganizis la kalvinistan eklezion. Oni konfiskis kaj transdonis al la reformitaj eklezioj la propraĵojn de la katolika eklezio; la registaro fondis universitatojn por krei pastorojn. La akordiĝo inter la ŝtato, eklezio kaj popola medio dum malmultaj jaroj rezultigis la plinombriĝon de la protestantoj de 10% al 70% el la loĝantaro. Tamen, la katolikoj havis ian liberon mesfari, se ili pagis antaŭe la koncernan punmonon.

Kiel ĉiam okazas, la plej kleraj homoj liberigis sin el la fanatikeco kaj sin turnis al la racionalisma kaj scienca pensadoj. La kartezianismo (3) kaj la spinozismo, (4) kiujn la popolaj pastroj malamegis kaj vigle atakadis, havis grandan nombron da simpatiantoj inter la komercistoj kaj nobeloj. Ĝuste dank'al la apogo de la alta ŝtatoficistaro, al ilia toleremo kaj komprenemo, Descartes kaj Spinoza povis konstrui siajn sistemojn kaj ilin eksponi. En tiamaj Francujo kaj Hispanujo ilia entrepreno estus tute neebla. La atmosfero de prospero, trankvila vivo, valorigo de la spiritaj kuriozaĵoj ankaŭ kontribuis al la kultura disvolviĝo. La

bezono pri korekta teksto de la biblio kondukis al la filologiaj studoj; la historio komence aperis kiel revolucia argumento, en verkoj klare partiaj, sed poste ĝi disvolviĝis pli ekvilibre. En la leĝoscienco Grotius starigis la ideon pri ligo de nacioj kaj deklaris, ke milito estas justa nur tiakaze, kiam ĝi estas rimedo por devigi la plenumon de la starigita leĝaro. En la scienco, Huyghens progresigis la astronomion, konstruis la unuan pendolhorloĝon kaj prezentis sian teorion pri la lumo kiel vibra movo: Swammerdam kaj Van Leeuwenhoek, uzante la mikroskopon, faris la unuajn eltrovojn en la mondo de la treege malgrandaj aĵoj. En la literaturo, kaj mi citas nur la plej bonajn aŭtorojn el tiuj, kiuj verkis en nederlanda lingvo, aperis la komediverkisto Bredero kaj la poeto Van den Vondel. La nederlandaj arkitektoj esprimis per siaj konstruaĵoj la tutan individuisman senton kaj la tutan ŝaton al trankvileco de la homoj el sia tempo. La skulptarto, kiun la kalvinismo ne favoris, ne havis rimarkindajn verkojn, sed la pentroarto, per Franz Hals, Van Ostade, Vermeer, Ruysdael, Rembrandt, liveris al la mondo grupon da majstroj: la kolora sameco de Nederlando komprenigis al ili la valoron de la nuancoj, la kalvinista vivo liveris al ili la ŝaton al sobreco. En iliaj pentraĵoj estas sento pri la medio, kiu verŝajne devenas de la agnosko de tio, kion la ligiteco, ne nur inter la homoj, sed ankaŭ inter homoj kaj aĵoj, reprezentis en la ekzistado de la nederlandanoj de la XVIIIa jarcento. Aliaflanke, la individuismo, la fiero pri sia penado, la atento pri la kapablo de ĉiu animo, kondukas nin al la psikologia analizado de la personoj,

kiujn ili reprezentis. En la portreto kaj pejzaĝo elmontriĝas la sama sekura regado super la teknikaj rimedoj, la sama serioza pripensemo, la sama povo pri tutaĵa harmonio kaj pri fiksiĝo de la necesa detalego.

Ĉio disvolviĝadis en atmosfero de trankvileco, sed ne de absoluta paco. La Navigacia Akto de Cromwell, kiu malpermesis la importadon per eksterlandaj ŝipoj, okazigis la militon kontraŭ Anglujo. La nederlanda militŝiparo estis venkita kaj admiralo Tromp mortis en la batalo. Johan de Witt, klera, nekoruptebla, tiom malproksima de la popolo kiom de la princo de Oranĝo, certigis la hegemonion en la Balta Maro kaj, en remilitado, venkis la anglan militŝiparon.

Ankaŭ inter Francujo kaj Nederlando la rilatoj ne estis bonegaj: la dogantarifa interbatalo kaj la simpatio de la francoj al la religio, lingvo kaj prospero de la sudaj provincoj tre ŝancelis la pacon. Enlande, la princo tagon post tago fariĝis pli influa, minacante la profitojn de la oligarkio. La popolo subtenis lin, ĉar ilia sola espero pri liberiĝo je la komercistoj kaj nobeloj direktiĝis al la princo. La povo de Johan de Witt malfortiĝis, kaj la militdeklaro de Anglujo kaj Francujo (1672a) surprizis la landon en stato de senarmeco kaj publika malkonfido. Oni subite sentis, ke la brilega periodo tuj finiĝos, kaj la paniko kaptis ĉiujn. La akvo ne sufiĉis por haltigi la invadantojn kaj la venkoj sur la maro ne sukcesis revenigi la trankvilecon. La naciaj gvidantoj estis tro riĉaj kaj tro civilizitaj, ol ke ili povus batali kun la furiozo kaj obstino el la tempo de la revolucio. La komerca

malvigliĝo ankoraŭ pli konfuzis la spiritojn: la senlaboreco pligraviĝis, la havaĵoj malplivaloriĝis en la borso kaj mankis varoj.

La energio de la *stadhouder,* de J. de Witt kaj de la administrantoj de Amsterdam povis fari malmulton. La eksterlandanoj konstante antaŭeniris kaj la enlanda ribelo estis tuj eksplodonta; grupoj da burĝoj kaj da popolanoj konspiris kontraŭ la aristokratoj kaj sentis la subtenon de la kalvinista eklezio, kiu ne pardonis la moderecon kaj toleremon de la registoj. Fine, okazis tumultoj: Johan de Witt kaj lia frato Cornelis estis murdataj, kaj princo Vilhelmo IIIa restis sola antaŭ tre malfacila situacio. Li ne senkuraĝiĝis, decidis profiti malkaŝe la popolan forton, reorganizis la armeon, venkis la francojn kaj la anglojn kaj subpremis la oligarkion.

Kiam oni subskribis la packontrakton en Nijmegen (1678a), Nederlando estis preskaŭ restarigita: la komerco rekomenciĝis normale kaj la perdoj de la komercistoj estis rapide kompensataj. La princo iĝis pli potenca kaj nomis la registojn, kaj eĉ la deputitojn de la Parlamento. La popolo sukcesis anstataŭigi la superregon de la riĉuloj nur per la superrego de la *stadhouder*.

Dum la lastaj jaroj de la XVIIa jarcento la situacio plimalboniĝis pro la militoj kontraŭ la eksterlando, pro la pezo de la impostoj, kiuj plialtiĝis ĉiujare, pro la senlaboreco de granda parto de la laboristaro kaj pro la pli kaj pli granda apartiĝo inter la malriĉuloj kaj la riĉuloj. Aliaflanke, la cirkonstancoj, kiuj ebligis la komercan brilegon de la respubliko, ŝanĝiĝis unu post alia: Germanujo fortigis la malforte-

con kaŭzitan de la Tridekjara Milito, Francujo komencis periodon de protektado al sia propra industrio per dogantarifoj; Anglujo prosperis kaj akiris koloniojn, el kiuj ĝi povis importadi krudaĵojn kaj kiuj estis bonaj merkatoj por ĝiaj fabrikitaj produktoj. Ankaŭ la ŝipkonstruado dekadencis: la navigacia tekniko pliboniĝis kaj Nederlando ne sciis sekvi la progreson. Ĉie regadis nova spirito de laceco, de timo antaŭ la riskoplenaj entreprenoj. La komercistoj inklinaj al ĉiuj riskoj malaperis, kaj komencis aperi bankieroj kaj borsospekulaciistoj; la industrio, venkite de la konkurenco fare de la aliaj nacioj, haltigis sian produktadon.

Kiel rezulto de ĉio, bandoj da senlaboruloj trairadis la stratojn kaj la kampojn, vivante, se tio estis vivo, per la publika almozdonado. Estas vere, ke formiĝis kolonia imperio, per Kaplando, Javo, Sumatro, Celebeso; sed ĝi taŭgis nur por riĉigi malgrandan malplimulton kaj por elmontri antaŭ la indiĝenoj spiriton de perfortego kaj de blinda ekspluatado, kiuj malplaĉegus al la alitempaj nederlandanoj. La surtroniĝo de *stadhouder* Vilhelmo IIIa en Anglujo aldonigis al ĉio la politikan maltrankvilon. Liaj du posteuloj, kiuj, ankoraŭ tre junaj, herede rajtis pri la trono de la princlando, devis meti sin sub regentecoj, kiuj estis malutilaj al la lando. La internacia politiko estis gvidata tre malvigle, kaj la enlanda politiko pli estis sinsekvo de okazaj rimedoj kaj tumultoj ol agado laŭ pripensita plano, ol kreo de bona labormedio. Ekster kaj en Nederlando, la potenculojn interesis nur gajni monon, tiom multe da mono kiom ili povis akiri, sed, en la realigo de tiu dezirego, ili uzis nek inteligen-

tecon, nek delikatecon, nek kuraĝon. La kulturo suferis pro la influo de la ĝenerala senvaloreco; la literaturo estis preskaŭ pura retorika ekzerco; en la plastikaj artoj, estis la sama regado de la tekniko super la esprimota ideo aŭ sento. Oni laboris tre bone, sed neniu havis efektivigindan ideon. Tamen ekzistis ia interesiĝo pri sciencaj aferoj: Linneus, sveda botanikisto, trovis bonan medion por sia studado, kaj fondiĝis sciencaj societoj, precipe por eksperimentoj pri fiziko. Kaj la francoj povis, preskaŭ tute libere, rifuĝi en Nederlandon kaj tie presi la librojn propagandantajn kontraŭ la reĝimo de ilia lando.

Tiu kunaĵo de indiferenteco kaj racionalismo malpliakrigis la religian aferon. De 1781a la katolikoj ricevis kultliberon, kaj la kalvinista superregado malpligrandiĝis. Tio estis alia aspekto de la tiam aperanta politika movado samtempe kontraŭanta la povon de la *stadhouder,* kiun oni trovis troa, kaj la riĉulojn, kiuj amasigis en siaj manoj preskaŭ ĉiujn riĉaĵojn de la lando. La popolo, kiu estis kalvinista kaj samtempe kontraŭ-plutokratia, montriĝis sendecida dum la agado, ĉar la kalvinista pastraro, la administrantoj, la aristokratoj, la grandaj komercistoj kaj la *stadhouder* kuniĝis por decide sin defendi.

La burĝoj estis la nura tavolo de la loĝantaro, kiu bone sciis, kion ĝi volis: ili bataladis kontraŭ la potenco de la klasoj al ili superaj, sed ne estis inklinaj toleri bonigon de la popola situacio. Ili havis la forton, kiun liveras la klara konscio pri la celo kaj, post 1789a, komence de la franca Revolucio, la apogon

de internacia interligo. En 1794a, la francaj armeoj, inter kies soldatoj iris Batava Legio, kiu konsistis el revoluciaj patriotoj elmigrintaj el Nederlando, invadis ĉi tiun landon kaj okupis la sudajn provincojn. Kreiĝis Konsilantaroj, kaj la atakoj de la franca generalo Pichegru estis faciligita de la sinteno de la meza klaso. La *stadhouder,* ne kapablinte elteni sian pozicion, forkuris al Anglujo, kaj la popolo konsideris sin liberigita fare de la soldatoj de la Revolucio. Tamen, ĉi tiu jam ne estis, koncerne la gvidantojn, la movado de la unuaj jaroj: baldaŭ la liberigintoj postulis tributojn kaj sin enmiksis severe en la politikan vivon de Nederlando, altrudante konstitucion konformigitan al tiu de Francujo; estis Direktorio, Leĝdona Parlamento, voĉdonrajto por ĉiuj, sub la kondiĉo, ke ĉiuj voĉdonu por tio, kion la registaro deziris balotigi. Oni faris troan centralizon por kontraŭbatali la aŭtonomecan tendencon de la provincoj.

Post la alveno de Napoleono ĉio plimalboniĝis. La neeblo komercadi kun la transmaraj landoj, pro la brita blokado, akutigis la ekonomian situacion, dum kiam la nederlandaj junuloj mortis sur la batalkampoj de tuta Eŭropo. La lando rezignaciis; la figuro de la Silentemulo iĝis la plej nekomprenebla el la tuta historio de Nederlando. La mono, putrigante la energiojn kaj la konsciencojn, sin venĝis je la homoj, kiuj ĝin estis adorintaj. En 1806a, Bonaparto decidis fordoni Nederlandon al sia frato kaj neniu ribelis. En 1810a, tiu ago finiĝis per pura kaj simpla anekso al Francujo, kun ĉiuj malkonvenaĵoj kiel deviga rekrutigo, cen-

zuro kaj polica spionado. Nederlando liberiĝis el la franca superregado nur post la falo de Napoleono. Sed neniu kuraĝis komenci novan vivon.

Atentinte la ĝeneralan politikan movadon en Eŭropo, la *stadhouder* sin proklamis reganta princo kaj, provizita per granda labor- kaj volkapablo, decidis esti «klarvida despoto». Li fondis la Bankon de Nederlando, kreis Industrian Kapitalon, organizadis industriajn ekspoziciojn por instigi la nederlandanojn al agado kaj kreis la bazojn por nederlanda komerca societo. Sed estis tre gravaj malbonoj, kiujn la suvereno ne sciis aŭ ne povis forigi: la homoj estis malpli inklinaj al laborado por nova lando ol al sopirado pri Nederlando pasinttempa. La kontraŭstaro inter la Nordo kaj la Sudo de la nacio pli kaj pli reliefiĝis: en unu flanko apatio kaj maldiligentemo, en la alia energio kaj iniciatemo. La mizero de la popolaj klasoj estis tre granda, sed la aliaj videble malamis ian ajn reformon. La sola faro estis la enkonduko en Nederlandon de moderigita liberalismo, kiu tute, aŭ preskaŭ tute, ne favoris la popolon. En 1830a, la ribelo de la belgoj, subtenata de Anglujo kaj Francujo, okazigis gravan krizon; la sudaj provincoj proklamis reĝo Leopoldon Ian kaj Nederlando, sen sufiĉa forto por ilin obeadigi, devis agnoski la novan Regnon.

Dek jarojn poste la politika kaj religia opozicioj iĝis en Nederlando tiom intensaj, ke reĝo Vilhelmo Ia abdikis. Lia posteulo starigis novan kaj pli liberalan konstitucion kaj, helpate de ministro Thorbecke, reorganizadis la landon. Fondiĝis grandnombraj lernejoj, privataj kaj publikaj, kaj la sociala leĝaro fariĝis iom malpli

severa, precipe koncerne la infanan laboron kaj punleĝaron. La komerco prosperis pro la pozicio de Nederlando kiel peranto inter Germanujo kaj Anglujo. Aliaflanke, la transmaraj teritorioj montriĝis minriĉaj kaj kapablaj por novaj kulturoj. La navigacio disvolviĝis, Amsterdam kaj Rotterdam fariĝis du el la plej grandaj interŝanĝejoj de Eŭropo. El la teknikaj lernejoj komencis eliri bonegaj inĝenieroj specialiĝintaj, kompreneble pri hidraŭliko kaj ŝipkonstruado. La ekonomia prospero faciligis, kiel dum la ora epoko, la kulturan progreson, precipe sur la scienca kampo: la nomoj de Lorentz, Van't Hoff, Zeemann, H. de Vries estas ligitaj al kelkaj el la plej gravaj eltrovoj de la moderna scienco: kiel juristo, iĝis rimarkinda Van Vollenhoven, kiu proponis la starigon de ligo de nacioj subtenata de internacia armeo; en la pentroarto, Van Gogh montriĝis unu el la grandaj artistoj de sia tempo kaj, en la arkitekturo, Berlage komencis la epokon de la vere moderna konstruado.

Tamen, la sama ekonomia prospero pligravigis la socialan aferon: la socialismo iĝis grava forto, sed la nekomprenema opozicio de la regantaj klasoj igis ĝin transiri de reformema sinteno al revolucia agado. La provo en novembro 1918a, jam dum la regado de reĝino Vilhelmino, okazigis fortan reakcion, kiu pli ekstremigis la poziciojn. Kun bonegaj ekonomiaj ebloj, Nederlando fariĝis batalkampo, pro absurda ekonomia situacio. La moderaj konservativuloj kaj la social-demokratoj estis la celo de la atakoj de la ekstrem-dekstra kaj -maldekstra grupoj. La mizero pligrandiĝis ĉe la popolo, kaj la registaro, bridita de

potencaj interesoj, malmulton faris por forigi ĝin. La regantoj, alvokante la patriotajn sentojn, klopodis unuigi la tutan landon, tio estas, ili deziris, ke la tuta lando konsentu pri la profitoj kaj vivpozicio de malplimulto el la loĝantaro. La senlaboruloj kaj la laborantoj, kiuj ricevis malaltegajn salajrojn precipe opiniis, ke ne meritas la penon defendi patrujon, kiu ilin mortigis per malsato; multaj el ili eĉ opiniis, ke dumtempa perdo de sendependeco povos al ili garantii pli bonan estontecon pro la malapero de la organizaĵo de la potenculoj. En majo 1940a, la germanaj trupoj trovis kampon bonege pretigitan por rapidega invado de la lando. Sed la mondo esperas, ke Nederlando, politike kaj ekonomie liberigita, scios restarigi la tradiciojn je individua digno kaj universalisma sento de siaj grandaj homoj el la pasinta tempo.

---

Klarigoj de la tradukinto:

(1) Moknomo uzita de la kontraŭuloj anstataŭ «ligo de l'nobeloj»,

(2) Popolo el la sudorienta duono de Belgujo.

(3) Filozofia sistemo de Descartes.

(4) Filozofia sistemo de Spinoza.

# BIBLIOGRAFIO

H. Van Gelder — *Histoire des Pays-Bas* — Kolekto «Colin», Parizo, 1936a.

Ramalho Ortigão — *A Holanda* — Lisbono.

# Enkonduko en la kulturon

Kulturvulgarigaj kajeroj el ĉirkaŭ 24 paĝoj

**PREZO: 1 kajero 2 resp. kup., 6 kajeroj 10 resp. kup.**

★

SERIO I

**Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo**
**Vivo kaj arto de Goya**
**Historio de Usono**
**La prahistoria arto**
**La budhismo**
**Vivo de Nansen**

SERIO II

**La portugala literaturo**
**Vivo de Pissarro**
**Pro tri pingvenaj ovoj**
**Historio de Nederlando**
**La vivo kaj laboro de J. A. Komensky**
**(duobla numero)**

★

RIMARKIGO — La unuaj 10 numeroj jam aperis; la aliaj sekvos laŭ la ebloj. Subtenu la iniciaton de la eldonantoj, por ke ili povu daŭrigi la eldonadon. Abonu kompletajn seriojn kaj varbu inter viaj amikoj. Varbinto de 10 abonantoj rajtas senpagan 1-serian abonon.

Mendu provnumeron per sendo de 2 resp. kuponoj al

**PORTUGALA ELDONA RONDO**

**ĴUS APERIS:**

# GALILEO GALILEI

## Scienca kaj morala valoroj de lia verko

BENTO DE JESUS CARAÇA

64 PAĜOJ 19 1/2 × 13 1/2

**PREZO: $0,50 us. dol., 7 resp. kuponoj**

«Estas vera ĝuo legi tiun ĉi libreton, kiu ne estas nura biografio pri Galilei, sed vivanta priskribo de la batalo por ideo. La teksto estas parolado farita en la portugala popol-Universitato, Lisbono. Aldonita al tiu ĉi teksto estas grafiko montranta la fluon de la ideoj pri nia mondo tra la epokoj. La konkludo de la parolado estis jena: «Ankaŭ nuntempe okazas kruela batalo por la valorigo de l'homo, kaj la reala malamiko estas ankoraŭ la sama — la trouza influo de la individuo, sur la socion. Kun la diferenco, ke tiu batalado nun okazas ne sur la astronomia tereno, sed sur la socia.

«Ni gratulas la tradukinton pro la vere bonega traduko, la klara lingvo kaj la evito de novaj vortoj. Tre bona preso sur bela papero inde kompletigas la enhavon de la libro.»

H. J. en *Esperanto,* organo de U. E. A.

★

**Eldonis kaj liveras:**

**PORTUGALA ELDONA RONDO**


LEGINDA KAJ POSEDINDA ESTAS:

# VIVO DE ZOLA

## AŬGUSTENO DE SILVA

**106 paĝoj 19 ½ × 13 ½**

**PREZO: $0,60 us. dol., 8 resp. kuponoj**



«Oni povas senti dankon al la tradukinto, ke li prezentis al la internacia legantaro tiel bonan biografion, ne nur por refreŝigi la memoron pri Zola, sed ankaŭ por atentigi al ni la makulojn en nia homa socio, kiuj ankoraŭ — bedaŭrinde — estas tre aktualaj.»

**M. S. en «ESPERANTO INTERNACIA»**

★

**Eldonis kaj liveras:**

**PORTUGALA ELDONA RONDO**

# LA NEVENKEBLA ĜENO

**MOMENTOJ DE TUALETA MIZERO**

## THEO THIJSSEN

El la nederlanda lingvo tradukis F. FAULHABER
Kun desegnaĵoj de BACH SCHUURMANS
Bela volumo lukse bindita kun 320 pĝ.
Bonega traduko — Ĝuiga legaĵo

Prezo: f. 4,90 ĉe la eldoninto

**LIBRO-SERVO DE F. L. E.**
**Roelantstraat 4 — AMSTERDAM - W (Nederlando)**

Havebla ĉe la Libro-Servo de P. E. R.
por 50$00 aŭ 30 rp. kup.

★

## JUĜU MEM!

Leginte la sensaciajn recenzojn pri «ESPERANTO 60-JARA» en kelkaj Esperantaj gazetoj, oni nun juĝu mem pri la enhavo de tiu ĉi verko, kiu pritraktas la evoluon de la literatura lingvo sub la jenaj ĉapitroj: Rerigardo, La foneto, Eksperimentoj, La klasikuloj, Modelo, Skuoj, Disciplino, Kvanto kaj kvalito, Revigliĝo, Perfektigaj provoj, Logiko aŭ..., Novaj direktoj, Diversnacieco, Stagno kaj reviviĝo, Perspektivoj, kun modeloj el komencperioda kaj moderna lingvaĵoj.

Prezo: kartonita f. 1,75; broŝurita 1,40.

ELDONIS KAJ LIVERAS:

**LIBRO-SERVO DE F. L. E.**, adreso kiel supre.

Portugala revendanto: **Portugala Eldona Rondo.**

Enlanda prezo por kartonita ekzemplero estas 20$00, al eksterlando 12 resp. kup., afrankite.

# KELKAJ PERLOJ EL LA ESPERANTA LITERATURO

(HAVEBLAJ ĈE LA LIBRO-SERVO DE P. E. R.)

**Jarmiloj Pasas** — Universala Historio verkita originale en Esperanto de *Hermann Haefker.* 500 paĝoj 23 × 16. Dika bindita volumo kun 6 artaj reproduktaĵoj kaj 11 geografiaj skizoj — afrankite 110$00 aŭ 64 rpk.

**Sveda Antologio** — 432 paĝoj 23 × 15, broŝurita — 67$50, 39 rpk.

**Gösta Berling** — *Selma Lagerlöf,* 552 paĝoj 20 × 14, broŝurita — 45$00, 30 rpk.

**La Faraono** — *B. Prus.* Historia verko tradukita el la pola originalo de la granda Esperanta stilisto *Kabe.* 3 volumoj, entute 590 paĝoj 21 × 15, broŝuritaj — 75$00, 43 rpk.

**Fabiola** — Rakonto pri la katakomboj verkita de *Kardinalo Wiseman.* Historia verko el 436 paĝoj 20 × 15, broŝurita — 50$00, 32 rpk.

**Petrolo** — *Upton Sinclair.* Du volumoj el entute 626 paĝoj 19 × 13, binditaj — 57$50, 37 rpk.

**Vivo de Zamenhof** — Bonega biografio de la aŭtoro de Esperanto verkita de *Edmond Privat.* 133 paĝoj 19 × 13, bindita — 28$00, 18 rpk.

**Riĉa kaj sen Mono** — *Philip Oppenheim,* 222 paĝoj 21 × 15, bindita — 27$50, 18 rpk.

**La Senlingvulo** — *V. Korolenko,* 191 paĝoj 20 × 15, bindita — 35$00, 20 rpk.

**Homoj en Milito** — *Andreas Latzko,* 190 paĝoj 20 × 15, broŝurita — 28$00, 16 rpk.

**Kulio** — *M. H. Székely-Lulofs,* 178 paĝoj 20 × 15, broŝurita — 28$00, 16 rpk.

**Fontamara** — *I. Silone* 192 paĝoj 20 × 15, bindita — 35$00, 20 rpk.; broŝurita — 28$00, 16 rpk.

KELKAJ PECOJ PRENITAJ EL

# SKIZOJ PRI NEDERLANDO

## PRI NEDERLANDAJ URBOJ

«Do arangante la aferojn laŭorde, mi rakontu, ke la unua pure nederlanda impreso (escepte de la verdaj lokomotivoj kun latunaj kaskoj surdorse) estas la brikoj. Kaj fenestroj. Kaj precipe bicikloj. Kaj precipe brikoj kaj fenestroj. Tiuj brikoj formas la lokan koloron de Nederlando; verda pejzaĝo, en kiu staras dometoj el malgrandaj, ruĝaj brikoj kun blankaj juntoj, dometoj kun grandaj, helaj fenestroj; kaj verda pejzaĝo kun brikaj vojoj, laŭ kiuj senbrue veturas bicikloj de unu ruĝa dometo al alia.........................................»

«Kaj la bicikloj! Multajn aferojn mi jam vidis, sed ankoraŭ nenie mi vidis tiom multe da bicikloj, kiom ekzemple en Amsterdam; tio estas apenaŭ bicikloj, sed kolektiva tuto, svarmoj, amasoj, aroj da bicikloj; tio iom similas al la rapida produktiĝado de bakterioj, la svarmado de infuzoroj aŭ la kirliĝado de muŝoj.........................................»

«Mi vidis monaĥinojn surbicikle kaj kampistojn, kiuj surbicikle kondukis bovinon, homojn surbicikle manĝantajn, veturigante kun si siajn infanojn kaj hundojn, kaj geamantojn man-en-mane surbicikle pedalantajn renkonte al rava estonteco. Mi diras al vi: tio estas nacio surbicikle..................»

## ANTIKVAJ URBOJ

«Ĉiuj intersimilas, ĉu ili nomiĝas Delft, Gouda aŭ Leiden: zono el senmova akvo kaj antikvaj brikaj katedraloj kun ĉarpentitaj volbaĵoj kvazaŭ la trunko de komerca ŝipo, kaj pompaj urbodomoj aŭ -dometoj, ornamitaj per ĉio, kio atestas pri luksama kaj riĉa urbanaro, kaj imponaj publikaj pasejoj, pordegoj kun turetoj, fiŝvendejoj, glorantikvaj universitatoj kaj memorindaj domoj, en kiuj oni iam mortigis iun princon de Orango aŭ iun ajn, kaj kvietaj stratetoj sen historio, per si mem jam formantaj fragmenton de l'dek-sesa aŭ dek-sepa jarcento, nekonscie pri la forpaso de l'tempo dormetantaj post sia senmova kanaleto.........................................»

«Urboj, konstruitaj sur fostoj: tio havigis al la nederlandaj urboj ankoraŭ unu karakterizaĵon. La afero estas jena:

(Daŭrigo sur la lasta kovrilpaĝo)

volante konstrui urbon, oni prenis pecon da akvo, ĉirkaŭigis ĝin per digo, sekigis ĝin, kaj poste oni konstruis sur ĝi dometojn Nederlandaj urboj kreskis, ne sur liberaj spacoj, sed en koncentraj zonoj; pro tio ili ne havas urbajn periferiojn; ili ne disvastiĝas kvazaŭ ekzantemo, sed situas orde kompakte sur verda herbejo. Mi diru, ke tie, kie finiĝas la katedralo, komenciĝas la bovino, kaj inverse: sur verda herbejo neatendite staras ruĝa urbeto: tio estas bela kaj pure nederlanda ..........................................................»

## NOVA NEDERLANDO

«Se vi tamen demandus al mi, kio en Nederlando plej multe al mi plaĉis, mi dirus sen longa pripenso: la loĝejoj. Kaj la bovinoj. Kaj la havenoj. Kaj Vermeer van Delft. Kaj la floroj. Kaj la grantoj. Kaj la firmamento. Sed, ĉar mi unue menciis la loĝejojn, do la loĝejoj unuavice...... .....»

«En Nederlando oni konstruas ne domojn, sed stratojn; la domoj formas kvazaŭ nur la internan aranĝon. Ili estas ŝrankoj kaj kestoj por la loĝado de la homoj; tiál oni forviŝas de ili la polvon, kvazaŭ de respektinda familia meblaro......»

## MALGRANDA POPOLO

«Se ne estus Rembrandt, la pilgrimanto ja ekhavus finimpreson, ke malgranda feliĉo de malgranda popolo estas bela kaj bona afero. Kiom bela, ebena, ĉarma kaj komprenoplena lando; kiom bone prosperas al ĝi, kaj kiom digne ĝi vivas! Montojn ĝi ne havas, sed faŭkas abismo de malĝojo, brilo kaj timveka belo. Tio estas Rembrandt........................»

«Nederlando estas lando de malgranda formato, sed de granda aŭ almenaŭ bona nivelo. Grandan industrion ĝi ne havas, sed ĝia industrio estas altkvalita. Ĝi ne posedas abundon da agrikultura tero, sed ĝi utiligis ĝin por la plej altkvalita produktado. La bazo de ĝia bonstato ne estas la maro, sed la bovinoj kaj la polderoj La nederlandanoj konkeris la mondon per kugloj de edama fromaĝo kaj tulipaj bulboj; sed al tiu ĉi nacia municio ili ja dediĉas grandan zorgon..................»

«Ĝia forto konsistas en la kvalito. Ĝia nacia idealo ne celas kvanton, sed kvaliton. Tiun kvaliton vi trovos ĉie: en la laboro, en la vivmaniero, eĉ en la naturo mem. Se vi tuj devus diri, per kio la nederlandanoj sin distingas en la mondo, vi ne ekpensus pri io grandioza, sed ĝuste pri la bonega, bela, preskaŭ perfekta kvalito de la pli multaj aferoj, kiujn ili produktas por si mem — kaj por la mondo. Tio koncernas ne nur la buteron; sed ankaŭ la sciencon...........»